

Theodor Körner,

## Am-ebrio

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Al vi, knabino, vibretante  
 Albatas nur la kor' en mi,  
 En am', fidele vin celante,  
 Mi strebas nur al vi.

Nur via nom' kun sankta sono  
 Ja pleniginta estas min;  
 En bril' de belo kaj de bono  
 Mi ĉiam vidas vin.

La am' el ĝermo delikata  
 Elkreskis kaj ne velkas ĝi,  
 En miaj sonĝoj, amegata  
 Knabino, vivas vi.

La kordojn batas mi, fluadas  
 Entuziasmo super min;  
 La kantoj, kiujn mi kantadas,  
 Tutsole nomas vin.

Mi sentas, se vi min rigardas  
 En paradizo kvazaŭ min.  
 Ĉielo mia tiam ardas  
 Ĉe via dolĉa sin'.<sup>2</sup>

...

---

<sup>2</sup>aŭ:

Je vi amplene mi rigardas,  
 En paradiz' mi sentas min,

Por ĝojo kaj pro am-doloro  
Sopiro sola nur en mi,  
Nur unu pens' en mia koro:  
Aĥ, estu mi ĉe vi!

*Traduko de la Germana poemo " Liebesrausch" de Theodor Körner en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984-06-20.*

*MR-155-1 / Arg-764-1535 (2013-01-06 22:56:18)*

---

Ĉielo mia rave ardas  
Ĉe via dolĉa sin'.